



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2023 (229)

8. 12. 2023

E-mental' ĉiam survoje



Foto: E-mental'

E-mental' – tio ne estas nur senfina ĉeno de amuzaj aranĝoj kun bongustaĵoj, sed ankaŭ vojaĝado kun Esperanto tra diversaj eŭropaj landoj. En novembro e-mentalanoj sukcesis viziti Sicilion kaj Győr. En decembro sekvos tradicia loksumado en Bratislavo kaj tuj poste antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio.

(Vidu fotoraporton el Sicilio kaj Győr sur la paĝoj 5 kaj 6)

EL LA ENHAVO

Vojaĝoj de E-mental' – fotoraporto	5
Milan Kundera kaj Esperanto	9
Marta Kubišová ricevis Ordenon de TGM ...	11
Tri saĝuloj	12
Lampiroj	13
Kristnaska poezio	17
Konfeso de Dominik Duka	23

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brighthouse@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Okazintaĵoj ekde oktobro

26/10/2023 – aperis Bulteno n-ro 2/2023

09/11/2023 – prelego de Tomáš Břicháček pri la fondiĝo de nia klubo en la jaro 1902 (*kunvenejo*)

23/11/2023 – prelego de Margit Turková pri la radikoj de la konflikto en Izraelo / Palestino (*kunvenejo*)

07/12/2023 – prezento de Vlasta Piščíková pri E-mentala vojaĝo al Sicilio en novembro 2023 (*kunvenejo*)

Venontaj aranĝoj

14/12/2023 – Zamenhoftago – tradicia kunveno ĉe Esperanto-monumento en Vyšehrad kun tosto, torto, kantado kaj amikeca babilado

21/12/2023 – Kristnaska vespero (*kunvenejo*)

Novaj prelegoj en nia jutuba kanalo

Pavla Dvořáková: *Profesiaj vidartistoj esperantistoj*

https://www.youtube.com/watch?v=QKTEc_-nll&t=546s

Margit Turková: *Historio de la prakonflikto en la lando Palestino*

<https://www.youtube.com/watch?v=iIpnq72cZL0&t=1117s>

Tomáš Břicháček: *Fondiĝo de la Esperantista klubo en Prago*


<https://www.youtube.com/watch?v=fEiVgku4C1g&t=1512s>

<p>Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové členské příspěvky na rok 2024. Výše ročního příspěvku činí 200 Kč; pro studenty a seniory 100 Kč. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na bankovní účet č. 2801096435/2010. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.</p>
--

Poznámka redaktora: Tímto číslem se završuje již desátý ročník Bultena pod mým vedením. Děkuji všem čtenářům za dosavadní přízeň, pravidelným i občasným autorům za jejich příspěvky a korektorovi Pavlu Petříkovi za jeho vytrvalou kvalitní práci.

Lasta ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH

Petr Chrdle



La 7-an de decembro aperas la lasta ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH: *Mi venos kvazaŭ la morto* de juna talentita kosova poetino Donika Dabishevci. El la albana originalo ĝin tradukis Bardhyl Adam Selimi. La aŭtorino estas aprezata de kritikistoj kiel la plej potenca virina voĉo de la lastaj jardekoj. Temas pri erotikaj poemoj, en kiuj ŝi kantas pri la amo: la amo kiel viva celo, kiel travivaĵo, kiel stato, kiel sperto, kiel legitimigo de la vivo mem, de nia ekzisto. Ŝia virino estas soifa kaj malsata por la amo, virino, kiu allogas, estas decidema ricevi tion, kion ŝi volas, rabia, arde brulanta en la amoro, kiu post la plenumiĝo de sia dominanteco povas forlasi vin. Tial la sindoniĝo al la

amora sovaĝa pasio laŭ la virino en ĉi tiuj poemoj estas neevitebla. Ĝi venas kvazaŭ la morto kaj neniel vi povas eskapi de ĝi. Do, ĝi venkas!

Per la libro *Mi venos kvazaŭ la morto* vi navigos tra la aspraj ondoj de la amo, de la pasio, de la ardiĝanta emo, tra la poemoj je alta artisma nivelo.

Novaj prelegoj de la brna klubo

Ni rekomendas ankaŭ la jutuban kanalon de niaj brnaj samideanoj <https://www.youtube.com/@esperantobrna>, kie aperas ĉiam novaj kaj novaj interesaj videoj.

En la lastaj monatoj oni aldonis interalie la sekvantajn prelegojn:

- M. R. Balicki: *La veneda lingvo — se romianoj kreskigus lipharojn*
- O. A. Fischer: *Esperanto-Simpozio en Gherla (Rumanio)*
- J. Magessa: *Invitilo al UK 2024 en Aruŝa*
- O. A. Fischer: *Kaktoj – pikantaj beluloj*
- M. Malovec: *Someraj kursoj de Esperanto en Lázně Bělohrad kaj Doksy*
- P. Chrdle: *Spirita literaturo ĉe KAVA-PECH*

Esperanta eliksiro

La 12-an de oktobro Pavla Dvořáková en nia klubejo prelegis pri profesiaj vidartistoj esperantistoj. Dum tiu evento ŝi ankaŭ prezentis al ni novan kanton. Ŝi mem muzikigis la poemon de Raymond Schwartz *Esperanta eliksiro*. Ni kune kantis kaj registris ĝin por nia jutuba kanalo. Bonvolu aŭskulti kaj kanti kun ni en tiu ĉi ligilo:

<https://www.youtube.com/watch?v=P3XO8UKLtLs>

La teksto estas sube. Kiel refreno estas uzata la tria strofo:

Ĉu vi jam konas l' eliksiron
De famkonata profesoro
Por faciligi la akiron
De nia lingvo -- sen doloro?

Se ne, ĝin provu, ĉar efike
Ĝi helpas ĉiam, sen escepto,
Kaj se vi volas, mi amike
Al vi parolos pri l' recepto:

Vi ĉiutage unu glason
De tiu ĉi likvoro trinkos
Kaj vi ekscios tuj amason
Da faktoj, kiuj vin konvinkos!

L' unuan tagon jam perfekte
Vi konos nian Fundamenton,
Vi propagandos eĉ infekte
Kaj kun fervor' la Novan Senton!

La duan tagon vi senmanke
Jam sendos multkolorajn kartojn
-- Kun la poŝtmarko eĉ bildflanke --
En nekonatajn mondopartojn!

La trian tagon vi science
Diskutos jam pri „ujo-io“
Kaj apartenos konsekvence
Santage al l' Akademio!

La kvaran tagon vi ver-vere
Tradukos je l' unua vido
Facilan tekston kaj fiere
Jam diros flue „ĝis revido!“

La kvinan tagon gajmiene
Vi ekĝojiĝos pri l' konstato,
Ke vi komprenas jam senpene
Vortludojn de la Verda Kato!

La sesan tagon, ho amiko,
Vi venke staros ĉe la celo,
Kaj jen sur via umbiliko
Kvinpinte kreskos verda stelo!

* * *

Sed nun, ne trinku plu glaseton!
Vi perdus mensan ekvilibron
Kaj vi eldonus ... aŭ gazeton
Aŭ nelegotan novan libron!

La teksto ĉerpita el <http://literaturo.org/>

Vojaĝoj de E-mental' – fotoraporto



Sicilio





Győr



Mia vojo al praga Esperanto-klubo

Leonarda Chaloupková

Mi komencos „de larĝe“, sed fine mi vere finos en la praga klubo.

En mia naskiĝurbo Svitavy jam delonge aktivis E rondeto, kies estro estis mia patro. Li gvidis kelkajn kursojn, sed bedaŭrinde ne tro da esperantistoj ĝis nun restis.

Krom instruado de kursanoj la patro instruis ankaŭ min, kompreneble hejme. Tiam mi povis esti eble kvarjara.

Oni povas diri, ke nia familio estis esperantista – vizitadis nin kaj restadis ĉe ni hejme kelkaj Esperanto-geamikoj, iam eĉ hungara eminenta esperantisto, verkisto Julio Baghy. Ni – gepatroj, mia avino, mi kaj mia pli juna frato Jan, partoprenis diversajn seminariojn. Mi malklare rememoras tiun en Doksy. La patro kaj la avino konis multajn homojn, havis multajn geamikojn. Tiel okazis, ke unuj el iliaj konatuloj, miaj pragaj „geonkloj“, tute neparencaj, invitis min en Pragon kaj la „onklino“ Štěpánka Šumavanská venigis min en pragan E-klubon.

Tie mi, sesjara, salutis la samideanojn esperantlingve kaj laŭdire mi havis sukceson kun mia parolado. Do, en la jaro 1958 ĝi estis mia unua vizito de la praga klubo.

Pli poste mi kun la avino ĉiuferie partoprenis kursojn en Somera E-Tendaro en Lančov kaj paŝon post paŝo mi atingis la plej altan ŝtupon – pravigon instrui la lingvon.

En mia junaĝo mi multe korespondis. Mia unua amikino estis germanino kaj kun ŝi mi estas en kontakto ekde la jaro 1959 ĝis nun. La ceteraj korespondamikoj malaperis. Mi partoprenis diversajn E-aranĝojn, ĉeestis fondiĝon de ĈEA en 1969, aktivis en junularo. Mi povas diri, ke mi estis sufiĉe aktiva esperantistino.

Mia edziniĝo kaj alveno en novan hejmon signifis finon de mia E-agado. Pri viro – esperantisto – oni diras „edzino – fino“. Ĉe ni okazis „edzo – fino“. Mia edzo ne deziris, ke mi okupiĝu pri Esperanto. Ĉu li ĵaluzis je miaj geamikoj, ĉu ekscitis lin, ke li ne komprenas la lingvon – mi ne scias. Kaj nun neniam plu mi povas demandi lin, ĉar jam antaŭ multaj jaroj li forpasis. Tamen preskaŭ dudek jarojn ni travivis kune, mi sen Esperanto.

Post la forpaso de mia edzo mi iom post iom revenadis. Mi pripensis, en kiun E-klubon mi aniĝu, ĉu en tiun en Prago, aŭ tiun en Benešov. Mia vilaĝo situas survoje preskaŭ precize inter la du urboj. Mi decidis por Benešov, kaj mi bone faris. En la klubo mi renkontis karajn, amikajn homojn. Post kelka tempo aperis tie sinjorino Vlasta, kiu serioze interesiĝis

pri Esperanto. Ni trovis komunan interparolon, ni trovis unu la alian. Neniam mi estus supozanta, ke oni povas trovi bonan, fidindan amikon eĉ en pli alta aĝo. Tiam amikon, ke oni povas konfidi ĉion, havi samajn aŭ similajn opiniojn, hobiajn, eĉ antaŭajn vivspertojn.

En la klubo mi sentis min bone. Sed venis koronaviruso kaj mortigis tri niajn anojn, entuziasmajn esperantistojn. Ni, restintaj, sentis nin kiel orfoj. Ekde foriro de niaj geamikoj la klubo funkcias ne tro bone. Ni kunvenadas en triopo, kelkfoje neniu povas veni.

Mi kun Vlasta fine decidis aliĝi en pragan klubon, kaj ni bone faris.

Ĉiun duan ĵaŭdon ni vizitadas la klubon, kie ni trovis novan Esperanto-familion.

Ni nur deziru, ke la kluboj vivu pli longe ol ni, ke ili estu sukcesaj kaj pleniĝu de novaj, fidelaj gesamideanoj.

Kion diris Margaret Thatcher ĉe la statuo de Winston Churchill la 17-an de novembro 1999

„Neniu vizitanto de Prago iam dubos, ke via estas unu el la plej belaj, civilizitaj kaj ĉarmaj ĉefurboj de Eŭropo. Ĉiufoje, kiam mi venas ĉi tien, ŝajnas al mi, ke mi eniras mondon de majestaj preĝejoj, potencaj palacoj kaj elvokiva skulptaĵo. Sed mi konfesas, ke mi tre ĝojas, ke vi trovis lokon por ĉi tiu nova statuo. Ĝi rememorigos al vi ĉi tie, kiel ĉiu generacio devas esti rememorigita – kaj meze de tiu tuta beleco – ke la prezo de libereco povas esti alta, ke ĝi ja povas postuli la oferon de ‚sango, laboro, larmoj kaj ŝvito‘. Sed ĉi tiu statuo de kavaliro Winston Churchill ankaŭ rememorigos al vi, kiel ĝi rememorigas al mi, pri io alia – ke libereco neniam rajtas pereji de la tero, ĝi devas eterne elteni.“



Milan Kundera kaj Esperanto

Margit Turková


Neniam realiĝos la kunvortigo „Milan Kundera **kaj** Esperanto“!

Tion ni konstata, kelkajn monatojn post la morto de la Aŭtoro (11.7. 2023), pri kiu parolas „la tuta mondo“...

Ne nur parolas... Liajn verkojn eĉ legas la tuta..., diras la statistiko, kiu kalkulas la lingvojn, en kiujn estis tradukitaj Liaj verkoj (certe superas la 50-on). Sed Esperanto inter ili ne troviĝas! Kaj ne troviĝos, almenaŭ ĝis validos la aŭtoraj rajtoj. Ĉu la kialo kuŝas en la ne-interesiĝo de esperantistoj?

Ne! Male! Jam antaŭ jaroj tradukis Jan Werner la eseo-volumeton „Můj Janáček“ (*Mia Janáček*).

Mi povas imagi, kiel „avide“ kaptis J. W. la verkon; li – la samurbano de M. K. (Brno), la samŝatanto de la komponisto Leoš Janáček, la muzikon, volis la grandulon prezenti al la internacia publiko, tra la verketo de Milan Kundera. Oni povas imagi la disreviĝon de Jan, kiam li ricevis jenan respondon rilate la publikigon: la eldonejo ATLANTIS (Brno) esprimis la reagon de la Aŭtoro (pere de kontakto al Věra K., la edzino de M. K.) – ke „Esperanto ne estu lingvo, en kiun oni traduku la verkojn de M. K.“ Punkto!!



Kvankam kiel esperantistino mi sentas la saman seniluziigon, mi „fieras“ (senmerite) esti samlandanino de M. K. Kaj mi interesiĝas pri Liaj verkoj. Kaj min interesas ĵurnalistaj analizoj, kie troviĝas la kerno de Lia verkistofameco. Traleginte liajn „romanojn“ kaj fakajn opiniojn pri Lia verkaro, mi faris la mian: per la romano „Žert“ (*La ŝerco*) Li starigis la unuan kolumnon de sia mondfameco. La dua estas – „Můj Janáček“... Li altiris intereson al la fenomeno, kiu koncernas nian (Lian) patrujon – Ĉeĥlandojn – multflanke. Mi dirus: la ĉeĥeco de Milan Kundera kaŭzis Lian mondfamecon. Do, ĉu samlandanoj, ĉu esperantistoj ni estimu la famulon (kaj ĉefe legu Lin).

Nun mi klarigos al la legantaro, kio instigis min skribi la artikolon. Ĉe la ĵurnalist-kampanjo post la morto de M. K. en la tag-gazeto PRÁVO mi trovis la artikolon sub la titolo: „**Kundera alvenadis inkognite, oni rememoras en Kunštát.**“ Tuj oni komprenas, kial Milan elvokadis grandan intereson pri sia personeco: pro sia videbla vir-ĉarmeco kaj senteblo inteligenteco...

La subtitolo vidigas al ni la kuzojn – do Milan-on kaj Ludvík-on Kundera en la kvindekaj/sesdekaj jaroj de la 20-a jarcento. La aŭtoroj de la artikolo en PRÁVO klarigas al ni la eventon: Milan alvojaĝis en Kunštát-on por en la familia kabano travivi kelkajn tagojn, en trankvila medio. „Bonvenigis lin nia patro“, diras la aŭtoroj – **Jan Kundera** kaj **Alena Vašková Vlčková**.

Do, ni vidas, ke en la familio Kundera troviĝis Ludvík – tiam jam fama verkisto, tradukisto el la germana (precipe de Bertolt Brecht), poeto. Kaj en tiu ĉi punkto mi povas eldiri miajn rememorojn: ja la verkisto Ludvík K. estis konata al mi delonge, ĉar Jiří Karen (la esperantisto el Prago) ofte parolis pri Ludvík, sia amiko kaj kolego; pri vizitado (kun Zuzana, la edzino) en Kunštát, en la familio Kundera, kie oni ĝuis ne nur kreivan medion, sed ankaŭ la pomojn el la ĝardeno de la familio (ni imagu, kiel Milan en la kabaneto verkas sian faman romanon „Žert“). Sub varmo de la rememoroj mi tuj skribis al la gefratoj Jan kaj Alena, kiuj sincere reagis, freŝe rememorante la vizitadojn de Karen-oj, esprimante subtenon al Esperanto. Mi aldonu ankoraŭ unu rememoraĵon: antaŭ kelkaj jaroj okazis konferenco de AEH (sub organizado de Jarmila Rýznarová, kaj pardubice-anoj) en la ripozloko Hodonín ĉe Kunštát. Tiam mi veturis al la urbo por vidi la domon, kiu apartenis al la poeto František Halas – poste al la familio Kundera. La anonctableton sur la domo mi trovis...

Marta Kubišová premiita per la Ordeno de TGM

Tomáš Břicháček

La 28-an de oktobro 2023, okaze de la ĉeĥa ĉefa ŝtatfesto, la prezidento de la respubliko premiis la elstaran kantistinon Marta Kubišová, iaman gravan protagonistinon de la kontraŭkomunisma rezisto, per la Ordeno de Tomáš Garrigue Masaryk.

La kanto „Modlitba“ („Preĝo“) kantita de ŝi la unuan fojon dum la invado de armeoj de Varsovia Pakto en Ĉeĥoslovakion en la jaro 1968 iĝis simbolo de la tiama popola rezisto kaj poste ankaŭ de la Velura revolucio en la jaro 1989.



La Ordeno de Tomáš Garrigue Masaryk estas alta ŝtata premio de la Ĉeĥa Respubliko. Ĝi estas destinita al personoj, kiuj faris elstarajn kontribuojn al la evoluo de demokratio, homaranismo kaj homaj rajtoj.

§ 3

Zřizuje se Řád Tomáše Garrigua Masaryka jako vyznamenání osob, které se vynikajícím způsobem zasloužily o rozvoj demokracie, humanity a lidská práva.

Tri saĝuloj

Kaj kiam Jesuo estis naskita en Bet-Leĥem de Judujo en la tempo de la reĝo Herodo, jen saĝuloj el la oriento venis al Jerusalem, dirante: **2** Kie estas tiu, kiu estas naskita Reĝo de la Judoj? ĉar ni vidis lian stelon en la oriento, kaj venis, por adorkliniĝi al li. **3** Kaj kiam la reĝo Herodo tion aŭdis, li maltrankviliĝis, kaj la tuta Jerusalem kun li. **4** Kaj kunveniginte ĉiujn ĉefpastrojn kaj skribistojn de la popolo, li demandis al ili, kie la Kristo devas naskiĝi. **5** Kaj ili diris al li: En Bet-Leĥem de Judujo, ĉar per la profeto estas skribite jene:

6 *Kaj vi, ho Bet-Leĥem, lando de Judujo, neniel estas plej malgranda inter la regantoj de Judujo; ĉar el vi venos reganto, kiu paŝtos Mian popolon Izrael.*

7 Tiam Herodo sekrete venigis la saĝulojn, kaj precize sciigis de ili pri la tempo, kiam aperis la stelo. **8** Kaj li sendis ilin al Bet-Leĥem, dirante: Iru kaj elserĉu zorge pri la knabeto; kaj kiam vi lin trovos, sciigu al mi, por ke mi ankaŭ venu kaj adorkliniĝu al li. **9** Kaj aŭdinte la reĝon, ili ekvojiris; kaj jen la stelo, kiun ili vidis en la oriento, antaŭiris ilin, ĝis ĝi venis kaj staris super la loko, kie estis la juna knabeto. **10** Kaj vidante la stelon, ili ĝojis kun tre granda ĝojo. **11** Kaj veninte en la domon, ili vidis la knabeton kun lia patrino Maria, kaj adorkliniĝis al li; kaj malferminte siajn trezorojn, ili faligis sin kaj prezentis al li donacojn: oron kaj olibanon kaj mirhon. **12** Kaj avertite de Dio en sonĝo, ke ili ne iru returne al Herodo, ili foriris per alia vojo al sia lando.

El la Sankta Biblio, Sankta Mateo, ĉapitro 2, versoj 1–12



Lampiroj

Jan Karafiát

Estis aŭtuno. Lumo estis malpliiĝanta kaj malvarmo estis pliiĝanta, kaj la lampiroj decidis do, ke ili nenien plu flugos. Nur paĉjo devis permesi al bapto-paĉjo, ke li kun panjo kaj Lampirĉjo ankoraŭfoje vizitos ilin, nome tuj morgaŭ, antaŭ ol vintro surprizos.

Do la morgaŭan tagon, post matenmanĝo, ili iros al baptopanjo. Kaj ili iris. Oni jam atendis ilin. Oni interkisadis, kaj Lampirĉjo kisis ŝian manon. Sed estis tie ankoraŭ iu: Baptopanjo prenis Lampirĉjon je mano: „Venu Lampirĉjo, jen kisu la manon ankaŭ al Janinka.“ – Kaj Lampirĉjo kisis, sed rapide sin kaŝis malantaŭ la panjo.

Ili sidiĝis ĉirkaŭ la forno kaj komencis rakonti. Sed baptopanjo iris en la antaŭĉambbron, al ŝranko, kaj Lampirĉjo ŝin sekvis. „Baptopanjo, kion vi havas?“ – Nu, Lampirĉjo, ni bakis kukojn kun kazeo kaj papavo.“ – Kaj jam la baptopanjo portis da ili plenan teleron ankoraŭ kaj ĉiu prenis po unu, kaj Lampirĉjo diris, ke li provos ankoraŭ unu kun kazeo. Kaj li prenis ankaŭ unu kun kazeo kaj ili sidis ĉirkaŭ la forno kaj babilis. Sed Lampirĉjo sidis iel nekomforte. „Venu, Skarabinjo, mi ion diros al vi.“ – Kaj Skarabinjo iris, kaj Lampirĉjo flustris al ŝi laŭte en oreleton: „Aŭskultu, kiu do estas tiu Janinka?“ „Nu, tio estas Janinka.“ „Kies do ŝi estas?“ – „Nu, ŝi estas nenies, ŝi estas sia propra.“ – „Kaj ĉu do ŝi tute ne havas lampireton kaj paĉjon?“ – „Ne, ŝi estas sola.“ – „Kaj kie do ŝi loĝas?“ – „Ho miru, tie ĉe l' arbaro, sur erikejo. Tian belan kabaneton ŝi havas en musko!“ – „Sed ŝi senĉese tiom tro rigardas min!“ – „Ho, ne timu, naivuleto. Ŝi ja estas bona. Sciu, la mielon – tiun ni ricevis de ŝi.“ – „Sed kiam ŝi...“

Sed tiam vokis baptopanjo Skarabinjon. Ili iris en la antaŭĉambbron kaj Lampirĉjo rapide sekvis ilin. „Baptopanjo, vi havas ankoraŭ ion?“ – „Mi havas. Vi ja estas nunjare la lastan fojon tie ĉi kaj venos denove nur somere.“ – „Kion do vi havas?“ – „Atendu! Vi miros. Venu, vi helpos nin.“ – Kaj Lampirĉjo promesis, ke li helpos. Kaj ili iris, sed ne al la ŝranko. Tie malantaŭe en la korto ili havis ankoraŭ provizejon, kaj en tiu provizejo – ho, tie baptopanjo havis tutan vinberon, tiel kiel ĝi deŝiriĝis de la vinberaro, tian bele, preskaŭ ruĝe bluan. Kaj nun baptopanjo kun Skarabinjo ĝin kaptis kaj portis ĝin tutan, tiel kiel ĝi estis, en la ĉambbron kaj Lampirĉjo helpis ilin. „Starigu ĝin tie ĉi sur la tablon, tio estos la plej



bona,“ konsilis baptopaĉjo. Kranon li jam havis preparitan, li prenis ankoraŭ marteleton, elpuŝis pedunklon, enpuŝis kraneton, kaj baptopano jam tenis kristalan taseton, por ke baptopaĉjo plenigu ĝin el la kranon. Kaj baptopaĉjo plenigis, ke tio ruĝis kaj saltis.

Kaj nun tostis unue panjo, poste Janinka, post tio baptopano, post ŝi paĉjo, poste baptopaĉjo, kaj ankaŭ al Lampirĉjo kaj Skarabinjo ili donis, sed nur leketi. Kaj ĉiuj ege ĝin laŭdis, tiel dolĉa ĝi estis! – Nur ĝi ŝajnis al ili tro forta. Kaj baptopano do diris: „Skarabinjo, rapide kuru al la herbejo kun kruĉo por roso.“ Kaj Skarabinjo rapide kuris al la herbejo, kun kruĉo por roso.

Baptopaĉjo altiris la tablon pli proksimen al la forno, kranverŝis el vino nur duonplenan taseton, plenverŝis ĝin per roso kaj prezentis ĝin ĉirkaŭe. Kaj tiel ili sidis kaj babilis: kiel foje baptopaĉjo malbonfartis. Tio estis baldaŭ, post kiam ili kun baptopano geedziĝis. Li elflugis tuj post sunsubiro, la tutan nokton bele lumis kaj kiam li antaŭ tagiĝo flugis ree hejmen, subite aperis tia grandega verda pego kaj preskaŭ-preskaŭ lin englutis vivantan. Baptopaĉjo tre ektimis, sed rapidege rekonsciiĝis kaj „frrr“ al fago, sed la verda pego „hrrr“ lin sekvis. Kaj tial baptopaĉjo rapidis en truon, sed la verda pego per beko tuj lin sekvis. Kaj ĉar la truo estis malgranda, ĝi jam per beko ĝin hakis. Baptopaĉjo pro timo tute tremis kaj liaj haroj hirtiĝis. – „Kion ja farus hejme baptopano, se...“ -- kaj li enrampis en la truon pli kaj pli profunden kaj la verda pego hakis per beko ankaŭ pli kaj pli profunden; ĝis ĝi plu ne povis kaj baptopaĉjon lasis. Kaj baptopaĉjo momenton ankoraŭ atendis kaj poste tre malrapide elgrimpis. Sed singarde, kaj bone li ĉirkaŭrigardis, ĉu eble la verda pego tie ankoraŭ sidas. Sed ĝi ne sidis. Kaj baptopaĉjo do rapide flugis hejmen.

La suno estis jam alte sur la firmamento kaj baptopano estis jam tute limigita. Ŝi vokis kaj ploris, flugis kaj kuris, rigardis kaj demandis, sed ĉie nenio, pri baptopaĉjo neniu sciis. Tiam ŝi kuris al la paĉjo de Janinka. Ankaŭ li nenion sciis, sed konsilis, ke baptopano nur ne ploru, ke baptopaĉjo estis obeema, kaj obeemajn lampirojn prizorgas Dio, tiel ke nenio povas okazi al ili, kaj eĉ se io okazas al ili, ke estas bone tiel, ĉar Dio tiel deziris kaj ke ne decas, ke lampiroj tre ploru kaj plendu. Baptopano iru nur hejmen kaj trankvile atendu. Kaj baptopano iris hejmen, kaj kiam ŝi revenas, jen venas baptopaĉjo al ŝi renkonte. Kiom ŝi ĝojis!

Kaj tiel ili babilis kaj ĝojis, ke tio jam pasis: Sed Skarabinjo dume ekploris: „Kio okazis al vi?“ demandis ŝin Lampirĉjo. „Ho, se la verda pego estus formanĝinta mian paĉjon...!“ – „Sed ĝi ja ne formanĝis lin.“ Kaj baptopaĉjo aldonis: „Kara Skarabinjo, tiam vi ankoraŭ ne estis naskiĝinta.“ Sed Skarabinjo respondis, ke estas negrave, kaj ŝi tamen plorsingultis.

Kaj nun rakontis paĉjo: Kiam baptopaĉjo kaj paĉjo estis ankoraŭ knaboj kaj estis la unuan fojon flugontaj, kunprenis ilin paĉjo de Janinka, montris

al ili vojon kaj rakontis al ili, kion, kiam kaj kiel ili devas fari. Kaj ili ĉion bone de li ellernis. Kaj foje, kiam ili jam flugis solaj, aliĝis al ili la paĉjo de Janinka kaj diris: „Venu, knaboj, mi kondukos vin ien. Sed vi devos silenti kaj atenti.“ Kaj ili konsentis, kaj flugis kaj flugis, ĝis ili alflugis al tiel belega urbo! Ĉirkaŭe estis belegaj ĝardenoj, kaj tie, preskaŭ jam ekster la urbo, en unu tia ĝardeno, staris granda belega domo, fenestroj ege grandaj kaj pordo larĝe malfermita, kaj en la pordon senĉese eniradis homoj junaj kaj maljunaj, knaboj kaj knabinoj. Kaj la paĉjo de Janinka diris: „Venu, knaboj, ni ne enflugas tien tra la pordo. Tie estas malfermita parto de fenestro.“ Kaj ili enflugis tra la fenestro, sidiĝis malsupre sur la kadron kaj rigardis.

De la plafono malsupren pendis tri grandegaj lustroj kaj belege lumis. Malsupre, sur la tero, estis plene da benkoj. Kiam iu venis, li eniris benkon, restis momenton staranta, rigardis en la ĉapelon kaj poste trankvile sidiĝis. Li kunhavis sub brako du librojn kaj unu el ili li malfermis. Kaj jen, unu el ili supreniris sur tian trabareton, kie estis malgranda tablo, kaj diris, ke ili kantos. Kaj ili komencis kanti kaj tiel bele kantis! Kaj kiam ili finkantis, ili leviĝis kaj tiu sur la trabareto komencis preĝi: ke ili estas hometoj malkuraĝaj kaj ke ili ne estis obeemaj, Dio ilin pardonu pro sia kara Filo kaj pere de sia Sankta Spirito ilin benu. Poste li malfermis sur la tableto egan libron kaj legis el ĝi pri fermita mano kaj pri vermeto, kaj ke oni ne timu. Kaj kiam ili ree sidiĝis, tiam li bele rakontis al ili, ke tiu, kiu timas Dion, devas timi nenium, li ja eĉ ne rajtas, ĉar Dio tion ne volas. Poste ili refoje preĝis kaj ree kantis kaj kiam ili estis jam elirantaj, ili metis ion en teleron ĉe l' pordo, kaj tio tintis. – „Ĉu vere, knaboj, tio estis bela,“ diris la paĉjo de Janinka. „Sed nun ni devas rapide ree lumi por plenumi, kion ni malzorgis.“ Kaj ili do rapide lumis. Kaj de tiu tempo paĉjo kun baptopaĉjo estis ofte tie. Kaj la preĝeton, kiun ili ĉiam preĝas antaŭ dormo, ili tie ellernis. Oni ĝin kantadis tie:

Dum vesper', bonvola Di',
ĉe vi ŝirmon serĉas ni
kiel eta kokidar'
sub' patrina flugilpar'.

Kaj tiel ili babilis kaj tio plaĉis al Lampirĉjo. Sed Janinka tiom tre rigardis lin! Iel li kvazaŭ timis ŝin... Kaj tiam ŝi turniĝas al li: „Nu, Lampirĉjo, kiam vi flugos?“ Kaj ĉar ŝi tion tiel bele diris kaj bele ridetis al li, li do ne plu tiom timis. „Ho, baldaŭ.“ – „Vi estos jam baldaŭ sufiĉe granda, nur ĉu vi scias bone obei! Ni vidos. Sed espereble vi invitos min, kiam vi flugos la unuan fojon, ke ni akompanu vin?“ – Kaj Lampirĉjo konsentis ilin inviti kaj panjo ĝoje aldonis, ke tio okazos eble jam dum la venonta tago de Sankta Johano.

Kaj tiel restis. Jam ili leviĝis kaj sin vestis por foriri. „Ho ve, denove la vintro!“ plendis panjo. – „Nu, la bona Dio aranĝos, ke ree estos somero kaj ni revidos nin,“ konsolis ŝin baptopanjo. Kaj komencis adiaŭado. Ili bele interkisiĝis kaj konfidis sin al Dio. Jam estis preskaŭ malvarmete. Ili do rapidis. Janinka al la arbaro en erikejon, Lampirĉjo kun paĉjo kaj panjo al la deklivo, tien, sub juniperon. Ili estis jam meze de la herbejo, kiam Lampirĉjo ankoraŭfoje rerigardis. Janinka jam estis for, baptopatro kun Skarabinjo staris antaŭ la kabaneto sub kverko kaj rigardis al ili. – „Adiaŭ, baptopanjo, je revido nur somere!“ ekkriis Lampirĉjo. Kaj ili ne plu estis videblaj.

Jam dumvoje diris paĉjo: „Ne, nenion ni prokrastu! Povus subite veni malvarmo kaj ni fartus malbone. Ni tuj devas eklabori.“ Kaj ili tuj eklaboris. Antaŭ ĉio panjo havu ĉion preta por la vintro. Kaj ili do transportis ĉion por ŝi el la provizejo en la kuirejon: pizon kaj grion kaj miligrion kaj grieton kaj farunon, ankaŭ iom da lento kaj poste ankoraŭ eron da butero. Poste ili tuj komencis transporti lignon. Ili ĝin havis en korteto bele ordigita sur sunluma loko. Ili ĝin do transportis en la kuirejon, kiom da ĝi ili povis, kaj krome ankoraŭ plenan antaŭĉambbron ĝis la pordo. Poste paĉjo grimpis sur ŝtupetaro, tra fenestreto al la subtegmento. Tie estis multe da seka, peceta musko. Per ĝi li bone kovris la plafonon, por ke ili ne sentu malvarmon de supre, la reston li ĵetis malsupren kaj la tegmento-fenestreton li alnajlis. Pasintjare ĝin la vento trarompis kaj mire, ke ĝi (la vento) la tutan tegmenton ne disŝiris. Kiel feliĉe, ke ne estis tre kruela vintro! Kaj nun ili ĉirkaŭiris la kabaneton kaj kie estis ia trueto, ili bone ĝin kalfatris, tiel, ke nenie povis trapenetri vento. Poste ili fermis la pordon per kroĉanso, enpuŝis kroĉhoketon, kaj la tutan pordon kovris per ligno, por ke ĝi ne ĝenu en la ejo. Laste, post ĉio, ili ŝtopis la fenestrojn en la kuirejo kaj en la ĉambro per musko, kaj kovris ilin bone per lignotabuloj. Da lumo ili havis tre sufiĉe. Kaj nun frostu! Ekstere jam bruegis!

Ili do nur ankoraŭ preĝis:
Je l' vesper', bonvola Di',
ĉe vi ŝirmon serĉas ni
kiel eta kokidar'
sub patrina flugilpar'.

Manpreno kaj kiso, „Dio estu kun ni kaj diabloj for de ni“, kaj ili kuŝiĝis kaj dormis kaj dormis.

Esperantigis Josef Kožený

Kristnaska vigilio

Karel Jaromír Erben

I.

Tomba mallumo. La fenestroj
tremas
de frosta vento. En la bril'
de la kameno la patrin' dormemas,
knabinoj sidas ĉe ŝpinil'.

„Ŝpinrado, zumu nun fervore!
Adventa temp' jam estos fore,
Kristnaska tag' proksimas nin!

Dum longaj, tristaj vesperoj vintre
volonte ŝpinas la knabin';
ŝi kredas firme kaj konsolas sin tre,
ke ne vaniĝos ŝia ŝpin'.

Al la knabino fianĉo venos,
ŝin alparolos per la dir':
Volu, amata, mi vin edze-prenos,
estos fidela via vir'!

Ni geedzigan prenu benon,
prezentu manon al la man'!
Kaj la knabin', ŝpininta fadenon,
nuptoĉemizojn kudras jam.

Ŝpinrado, zumu nun fervore!
Adventa temp' jam estos fore,
Kristnaska tag' vizitos nin...“

II.

Hej, mistera Kristo-tag',
sankta vigilio!
Ĉu en via plena brak'
por ni pretas io?

Kuk' por mastro en la dom',
por la koko ajlo,
pizo por kokin', kaj pom'
al la bovin-pajlo;

ostoj por la frukt-ĝarden'
post festeno lasta;
or-porkido por vi mem,
se vi restis fasta.

Mi, knabino juna kun
plenlibera koro,
tre sekretan penson nun
portas en memoro:

Sub arbaro ĉe la kluz'
- kiel avinetoj -
blankajn kapojn klinis ĵus
salik-siluetoj.

La salik' per kurba brak'
mister-plene gestas,
kie diafana lag'
sub glacio nestas.

Al knabino luna torĉ'
- laŭ legend' antikva -
knabon montros per la sorĉ'
en spegulo likva.

Nek meznokto, nek magi'
baros mian volon:
per hakilo rompos mi
la glaci-tavolon!

Mi rigardos al spegul'
de la lag' avide -
kaj aperos la karul'
al mi vid-al-vid.

III.

Du karaj nomoj: Hana, Maria,
knabinoj kiel rozburĝon':
Ĉu belas unu pli ol alia?
Ho, malfacila lecion'!

Se unu al la knabo parolas,
li emus iri tra la flam';
se la alia rideti volas,
unuan li forgesis jam. -

Meznokto... Sur la ĉielo vasta
aroj da steloj svarmas nun,
kiel ŝafidoj ĉirkaŭ knabo paŝta,
kaj paŝtas ilin hela Lun'.

Sankta Pranokto trans la tero arkas,
meznokto de l' Kristnaska tag'...
Jen: novan neĝon freŝaj spuroj
markas
de la vilaĝo al la lag'.

Knabin' genuas super akvo laga,
al ŝi alia klinas sin:
„Haninjo kara, ĉu jam imaga
vidiĝas al vi la destin'?”

„Jes... estas kvazaŭ dom' de
Václavo -
sed tamen en mallumo nur -
Jam pli klariĝas la songê-enhavo:
en pordo staras vir-statur'

kun verda jako – Li flanken ŝovas
sian ĉapelon kun dandem' -
Sur ĝi mi mian bukedon trovas -
- Ho Dio! Estas Václav mem... !“

Ŝi saltleviĝas, voĉas ĝojkrion -
L' alia genufleksas nun:
„Maria kara, kian vizion
favoras al vi la Fortun'?”

„Mi vidas – vidas – Nigraj nebuloj
vualas al mi ĉion plej -
Aperas ruĝaj kandelo-bruloj,
kvazaŭ mi estus en preĝej' -

Nun ŝajnas io blanka ekbrili -
Jam lumas al mi hela tag':
Blankaj knabinoj – kaj inter ili -
ho Dio ! – kruco, sarkofag'!”

IV.

Sub varmeta vento-tuŝ'
klinas sin la grenoj,
en printempa flora vest'
pompas la ĝardenoj.
Muziko trilas. Hejsa! De altaro
kun gasta ar' veturas juna paro
post la pastra beno.

Václav ĉarmas kiel flor'
inter la popolo;
kun ĉapelo flanke kaj
verda kamizolo.
Kiel Kristnaske lin ekvidis Hano,
tiel ŝi kun li iras man-en-mano
en edzina rolo.

- - -

Ekis la aŭtuna vent'
la someron nei.
Mortsonoras: Juna korp'
devis forperei.
Blankaj knabinoj portas ĝin al
dormo.
Kandeloj brulas. Flor' – Funebra
korno
daŭras triste vei:
Miserere mei.

Kiun kovras en la ĉerk'
flora kron' gracia?
Mortis, ho ve, mortis for
virgulin' lilia!
Kvazaŭ rosita ŝia floro freŝis,
kvazaŭ falĉite ŝia vivo ĉesis -
Mizera Maria!

V.

Revenis vintro; frosto uraganas;
en hejma ĉambro varmas bril'
de la kameno. La patrin' malsanas,
knabinoj sidas ĉe ŝpinil' . .

„Ŝpinrado, zumu nun fervore!
Adventa temp' jam estos fore,
Kristnaska tag' proksimas nin.

Hej, mistera sankta tag',
se mi vin memoras,
dolorige pika sag'
mian koron boras!

Lastan vintron nia ĥor'
sidis ankaŭ kune -
Unu jaro pasis for,
du jam mankas nune:

Kudras Hana en kufet'
por infano sia...
Tri monatojn tomba bed'
kuŝas sur l' alia,
mizera Maria!

Laste sidis nia ar'
ankaŭ flank-ĉe-flanke -
Kaj se pasos unu jar',
kiu estos manke?

Fervore zumu, rad' ŝpinila -
La mondo estas tre labila,
kaj homa vivo estas song'...

Tamen preferu fals-espere revi
marŝi la vojon en obskur',
ol la vualon de l' estonto levi,
certiĝi pri la sort-terur'...“

Esperantigis Tomáš Pumpr

Decembro Prosinec

Fráňa Šrámek

Po sněhu půjdu čistém, bílém,
hru v srdci zvonkovou.
Vánoční země je mým cílem.
Až hvězdy vyplovou,
tu budu blízko již.
A budu ještě blíž,
až lesní půjdu tmou.

Tu ztichnu tak, jak housle spící,
a malý náhle, dětinný,
a v rukou žmoule beranici,
včarován v ticho mýtiny
tu budu blízko již.
A budu ještě blíž,
svých slz až přejdu bystřiny.

Mír ovane mne, jak by z chléva,
v němž vůl a oslík klímají,
světýlka stříknou zprava, leva,
noc modrá vzlykne šalmají,
tu blízko budu již.
Ach, jsem tak blízko již,
snad pastýři mne poznají...

Sur pura blanka neĝ' mi iros
kun sonorila lud' en kor',
al land' Kristnaska mi aspiras.
Kaj post aper' de stela glor'
proksimos jam la cel'.
Proksimos pli la cel'
dum iros mi tra arb-odor'.

Silentos mi – dormanta kordo -
kaj kiel en la knaba temp'
peltĉapon premos mi en tordo
sub sorĉo de l' arbar-silent'.
Proksimos jam la cel'.
Proksimos pli la cel'
post ĉes' de mia plor-torent'.

Min pac' alblovos, kvazaŭ stalo
kun bov', azeno en proksim'.
Jen ambaŭflanke lum-vualo,
kaj ŝalmos blua nokta sin':
Proksimas jam la cel'.
Proksimas, aĥ, la cel',
paŝtistoj eble konos min.

Esperantigis Rudolf Hromada

Kristnasko Vánoce

Jaroslav Vrchlický

Hlas zvonů táhne nad závějí,
kdes v dálce tiše zaniká;
dnes všechny struny v srdci znějí,
neb mladost se jich dotýká.

Jak strom jen pohne haluzemi,
hned střásá ledné křišťály,
rampouchy ze střech visí k zemi
jak varhan velké píšťaly.

Zem jak by liliemi zkvětla,
kam sníh pad, tam se zachytil;
bůh úsměv v tvářích,
v oknech světla,
a v nebi hvězdy rozsvítil.

A staré písně v duši znějí
a s nimi jdou sny jesliček
kol hlavy mé, jak ve závějí
hlas tratících se rolniček.

Můj duch zas tone
v blaha moři,
vzdech srdcem táhne hluboce,
a zvony znějí, světla hoří –
ó Vánoce!
Ó Vánoce!

Voĉ' sonorila neĝojn kronas,
en for' ĝi softe perdas sin;
en koro ĉiuj kordoj sonas,
ĉar la juneco tuŝas ĝin.

Se inter arboj nur ekventas
glaci-kristaloj falas jen,
de tegmentar' glacio pendas,
kiel fajfiloj de orgen'.

Ter' kvazaŭ florus lili-bedoj,
teniĝas ĉie neĝtavol';
fenestre lum',
sur vang' ridetoj,
ĉiele steloj laŭ di-vol'.

En ni malnovaj kantoj sonas,
kun ili song' pri l' kripa bril',
kaj ĉirkaŭ mia kap' alfonas
sinperda voĉ' de koltintil'.

En beatec' anim'
plezuras,
suspir' profunda en la kor',
sonoroj sonas, lumoj brulas -
Kristnaska glor',
kristnaska glor'!

Esperantigis Jiří Kořínek

Vánoční píseň Kristnaska kanto

Jaroslav Seifert

Jak ptáci zimomřiví
v tom teskném příběhu,
ti, které neuživí
třpyt hvězdic na sněhu,
my sešli jsme se snící
nad lžičkou olova,
kéž by nám mohlo říci
naš osud doslova.

Když už se řítí v spěchu
ten žaluplný děj,
svíčičko na ořechu,
hoř pro nás pomalej,
ať zvučí trouby hlásné
i zpěvy andělů
dřív, než přijde smrt a zhasne
naš dech ve svém pocelu.

A těm u sukní matek
dej úsměv do oček,
klín plný cukrlátek
a hodně vánoček,
když už se řítí v spěchu
ten žaluplný děj,
svíčičko na ořechu,
hoř pro nás pomalej.

Kiel la birda ar' frostiĝa
en tiu trista mir-fabel',
ar', kiun nutri ne sufiĉas
per bril' de neĝa stel-juvel',
kunvenis ni por ree revii
super fandita plumbo-pec',
ho, povu ni de ĝi ricevi
aŭguron pri la estontec'.


Se jam sin rulas kun akcelo
eventoj plenaj de dolor',
ho kandelet' sur nuksa ŝelo,
por ni pli lante brulu for',
trumpet-sonoro nun necesos
kaj kantoj de anĝela lir'
antaŭ ol venos Mort' kaj ĉesos
sub ties kiso nia spir'.

Rideton veku en okulo
de tiuj ĉe patrino jup'
bonbonojn donu sen kalkulo
kaj multon el Kristnaska kuk',
se jam sin rulas kun akcelo
eventoj plenaj de dolor',
ho kandelet' sur nuksa ŝelo,
por ni pli lante brulu for'!

Esperantigis Rudolf Hromada

Konfeso de Dominik Duka

Tomáš Břicháček



En decembro 2023 aperas nova libro *Zpověď* (Konfeso) de la kardinalo Dominik Duka, eksa ĉefepiskopo de Prago kaj estro de la katolika eklezio en la Ĉeĥa Respubliko (ekde 2010 ĝis 2022).

Kiam li finis en sia funkcio, mi skribis pri li artikolon *Dobrý pastýř v nedobré době* (Bona paŝtisto en nebona tempo). Mi rimarkis tie, ke Duka estis dum la tutaj dek du jaroj de sia mandato ĉiuflanke pozitiva, stabiliga, unueciga faktoro en nia publika sceno. Li ĉiam staris klare kontraŭ dekadencismo, sed ankaŭ kontraŭ homa vulgareco kaj aroganteco. Li neniam kompromisis kun ĉi tiuj specoj de malbono. Li estis unu el la voĉoj de la racio el la normala mondo, kiu sonis kiel refreŝigo kaj

kuraĝigo al tiuj, kiuj volis aŭskulti. Kaj dank' al li, tiuj dek du jaroj estis iom pli bonaj, ol ili povus esti.

Sekvas traduko de la akompana teksto de la eldonisto:

Ĉi tiu libro estas unika konfeso de la estro de la katolika eklezio en la Ĉeĥa Respubliko, nun jam emerita ĉefepiskopo, kardinalo Dominik Jaroslav Duka. Pastro, kiu aŭskultis multajn konfesojn, nun „konfesas“ mem. Temas pri atesto de viro, kiu estis laboristo, soldato de baza militservo, politika malliberulo, kleriko sur ĉiuj niveloj.

La kardinalo klarigas, kial li fariĝis pastro, kiujn malfacilaĵojn li alfrontis en sia vivo kaj li etendas sian biografion ĝis nuntempo. En la libro oni ne trovos rakonton de faktografia vivprotokolo, kiu estas atingebla en multnombraj publikaĵoj kaj artikoloj. Estas pripensado de vivokazaĵoj, kiu estas influita de la paso de la tempo.

La kardinalo Dominik Duka diras: „Mi trairis multajn lokojn kaj profesiojn, kiujn mi foje elektis, foje ili estis elektitaj aŭ ordonitaj por mi.“ Li citas vortojn de Jan Neruda: „Mi kelkio estis en la Dia vivo kaj kio mi estis, tio mi ĝojis esti.“



Šťastné a veselé Vánoce a úspěšný nový rok 2024.

Feliĉan kaj ĝojplenan Kristnaskon kaj sukcesan novan jaron 2024.

Venontaj kunvenoj: 4. 1. / 18. 1. / 1. 2. / 15. 2. / 29. 2. / 14. 3. / 28. 3. /
11. 4. / 25. 4. / 9. 5. / 23. 5. / 6. 6. / 20. 6.

Klub esperantistů v Praze,

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7 – Holešovice, PSČ 170 00

Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>

E-mail: paha@esperanto.cz

Facebook: <https://www.facebook.com/esperantoprigo>

YouTube: Esperanto Prago

Schůzky: Ve Smečkách 25, Praha 1 – Nové Město, PSČ 110 00